

La Junuloj

AMAZON
5
2010

Nacia Kostumo de Tutmondo
Kovrila Artikolo / Boi-Bumbá
Komiksó / LERNEJ' LERNEJ'
Vendejo de Frostigitaj Manĝaĵoj de Kato
Metamorfozo en Scienc-Fikcio

代表代行挨拶

サルートン！今回、暫定的に代表代行の役目を授かった岡部明海です。日本の青年エスペランティストの活性化を図るため、La Junuloj を復刊しました。この機関誌を一つの媒体として、全国に散らばっている青年エスペランティストが交流し、エスペラントを学習するモチベーションになることを願っています。また、復刊にあたり、エスペラントの国際性を生かし、La Junuloj を世界の人々にも読んでいただけるような機関誌にしたいと希望します。日本発信の世界へ向けた若者雑誌です。応援とご協力を何卒よろしくお願い致します。

前代表挨拶


JEJ 前代表 (2008 年 12 月～2009 年 11 月) の天野です。諸事情により、今年度 (2010 年) の後任選挙を実施することができなかったため、全役員の権限を代表代行に委譲します。この度、La Junuloj の復刊の知らせを聞き、大変喜ばしく思います。正会員、また賛助会員のみなさま、La Junuloj の発刊が途切れて申し訳ありませんでした。今後とも JEJ をどうぞよろしく願います。

執筆者紹介



藤森耕平
FUJIMORI Kohej
Nacia Kostumo de Tutmondo
... P.2

Se vi daŭros esperanton, iam ni renkontiĝos.



ASANO Keisuke
KOVRILA ARTIKOLO
... P.3

&
編集・レイアウト・デザイン・表紙撮影



JAGI
LERNEJ' LERNEJ'
... P.5

Desegni komikson fariĝis iom ĝoje por mi.



林幸子
HAJAŠI Sačiko
Vendejo
de
Frostigitaj Manĝaĵoj
de
Kato
... P.7



Lyz HUANG
METAMORFOZO
EV
SCIENC-FIKCIO
... P.6



岡部明海
OKABE Akiumi
Traduko:
KOVRILA ARTIKOLO ... P.3

Ĝuu La Junuloj!

会費振込

郵便振替口座：00140-8-755070
加入者名：JEJ
会費：正会員 (30 歳未満) 1500 円/年
高校生まで 400 円/年
新規入会者 750 円/年 (初年度のみ)
賛助会員 (30 歳以上) 2000 円/年

Ĝiri kotizon

Japana poŝtoĝira konto, Numero : 00140-8-755070
Nomo de konto : JEJ
Kotizo : Regula membro (malpli ol 30-jaraĝa) 1,500 enoj / jaro
Ĝis altlerneĵano 400 enoj / jaro
Novmembriĝinto 750 enoj / jaro nur en la unua jaro
Subtenanto (30-jaraĝa kaj pli) : 2,000 enoj

あなたも記事を書いてみませんか？

「La Junuloj」では皆様の投稿やご感想を募集しています。
左記宛先までお送りください。
次号は 7 月に発行します。

Ni atendas vian penson kaj kontribuon per via artikolo!

Bonvolu sendi ĝin al la maldekstra adreso. La venonta numero eldoniĝos en julio.

電子版・音声版について

今号の電子版・音声版を試験的に公開しています。詳しくは左記 J E J のホームページをご覧ください。

PRI RETA KAJ SONA VERSIO

Ni prove publikigas retan kaj sonan version de ĉi tiu numero. Bonvolu viziti al retejo de JEJ (skribita maldekstre).

La Junuloj 2010 年 5 月号 (No.86)

2010 年 5 月 1 日 発行
編集人 ASANO Keisuke
発行人 日本青年エスペラント連絡会
〒162-0042 東京都新宿区早稲田町 12-3
エスペラント会館 気付
メールアドレス：
jej_kontakt@yahoogroups.jp
Web ページ：<http://www.jej.jp/>

La Junuloj Majo 2010 (n-ro 86)

La 1an de Majo, 2010 eldonita.
redaktoro: ASANO Keisuke
eldonanto: Japana Esperanto-Junularo
JP-162-0042, Wasedamati 12-3,
Sinzyuku-ku, Tokio, Japanio
Ret-adreso：
jej_kontakt@yahoogroups.jp
Web：<http://www.jej.jp/>

Nacia Kostumo de Tutmondo / MĜI MORI Hohej La 1a fojo - Galabejo

Galabejo estas egipta kostumo. Ĝi estas tunika robo por geviroj. Tuniko estas tuba vesto kun manikoj aŭ sen manikoj. Galabejo plejofte havas longajn manikojn kaj ne havas kolumon. La manikoj vastiĝas direkte al manikbuŝo. Fronto de galabejo estas tajlita de koltruo ĝis sub brusto. La tajlito ne havas butonon. (Vd. Figuro 1) Ĉar portanto de galabejo ne portas zonon kaj laĉon, galabejo estas bone aerumata.

Koloro de galabejo por viro plejofte estas blanka, nigra, bruna, kaj blua. Kelkaj galabejoj havas strion. Galabejo por virino ofte estas brodita, kaj ĝia koloro estas pli diversa ol por viro. Galabejo por turistoj estas efektive tro brodita. Materialo de galabejo estas kotono, kanabo, muslino (somera lano).

Egiptia kulturo estas proksima al Eŭropo kaj Usono kvankam la nacio estas araba. Efektive en Egiptio oni povas trinki alkoholaĵon. Ĝenerale arabo ne portas kravaton, ĉar ili kredas ke kravato estas simbolo de idolkulto. Sed egipto nodas kravaton. Malgraŭ arabo, egipto portas jakon kun kravato. Kaj sur jako ili portas galabejon.

Porti galabejon sur jako sentigas al homo varmegon. Do iame oni deziras malvarmetan kostumon similan al galabejo. Por tio oni volas vesti sin nur per galabejo kaj sur ĝi oni volas nodi kravaton. Mi elpensis galabejon sur kiu oni povas nodi kravaton. Estas jene: La nova galabejo havas ĉemizkolumon kun soklkolumo kaj tajlito de fronto havas butonon. (Vd. Figuro 2) Sur ĉi tiu galabejo oni povas nodi kravaton kaj vesti sin per jako.

Verdire ĉi tiu estas ordinara ĉemizo kun tre longa basko. Sed galabejo estas galabejo. Do esenco de galabejo estas ĉemizo kun longa basko, kvankam estas diferencoj ĉu ĝi havas kolumon aŭ ne kaj ĉu ĝi havas manumon aŭ ne.

世界の民族衣装

～ 第1回 ガラベージャ ～

世界中の魅力的な民族衣装を紹介する

“Nacia Kostumo de Tutmondo”

第1回は、自分でもオリジナルの衣服を作っておられる藤森耕平さんが、エジプトの民族衣装ガラベージャを取り上げます。

ガラベージャの構造や素材、そしてアラブの人々とエジプトの人々のガラベージャの着方の違いなどを紹介します。

また、新型ガラベージャの提案も行います。



VORTOJ

egipt-o: エジプト人	kanab-o: 麻
rob-o: ワンピース	muslin-o: モスリン
tub-a: 筒状の	lan-o: 羊毛
vest-o: 服	malgraŭ: ～にもかかわらず
manik-o: 袖	arab-o: アラビア人
kolum-o: えり (kolo: 首)	jak-o: ジャケット
tajl-it-o: スリット	kravat-o: ネクタイ
kol-tru-o: 首を通す穴	idol-kult-o: 偶像崇拜
brust-o: 胸	nod-i: 結ぶ
zon-o: 帯	ĉemiz-o: シャツ
laĉ-o: (服などの) ひも	sokl-kol-um-o: 台えり
aer-um-i: 風を通す	ver-dir-e: 実を言うと
stri-o: しま模様、ストライプ	bask-o: 裾
brod-it-a: 刺繍を施された	man-um-o: カフス
koton-o: 綿	

KOVRILO ARTIKOLO

La 1^a fojo

Boi-Bumbá

ASANO Keisuke / Traduko de OKABE Akiumi

(vivakeisuke@hotmail.com)



毎号のカバーストーリーを紹介する "KOVRILO ARTIKOLO "

今号では、ブラジルはアマゾンで毎年開催されている、ボイ・ブンバ祭を現地取材したレポートをフリーライターのアサノケイスケがお送りします。"アマゾンの奇祭"、"世界最大のオペラ"とも呼ばれるこのお祭り、その舞台であるパリンチンスの町はあらゆるものが赤と青に塗り分けられた不思議な町でした。日本ではあまり知られてこなかったボイ・ブンバ祭の歴史を紐解けば、日本人との意外な関わりや、人々の祭りへの想いが浮かび上がってきました。

Estas eta urbo *Parintins* (legu *parinçins*) sur la insulo sur la rivero Amazono en Brazilo. Lastjare mi visitis ĉi tiun urbon per aviadilo kaj ŝipo. La celo estis partopreni en la festivalo, *Boi-Bumbá* (legu *boi bumba*), kiu alinomiĝas "Bizarfesto de Amazono". *Boi* signifas bovon en la portugalo kaj *Bumbá* tumulton aŭ tambursonon. Dum tri tagoj en la lasta semajno de junio, homoj kolektiĝis ne nur el la tuta Brazilo sed el la tuta mondo por partopreni en tiu festivalo. En la festivalo du teamoj, ruĝa teamo "*Garantido* (legu *garançido*)" kaj blua teamo "*Caprichoso* (legu *kapriŝozo*)", alterne prezentas kaj konkuras dancojn, kantojn kaj festajn dekoraciitajn ĉaregojn dum tri noktoj potage por du kaj duono da horoj. La prezentaĵoj temas folkloran rakonton, tradicion de la indiĝenoj kaj la naturon de Amazonio. Ne nur administro de la festivalo, sed la tuto de muziko, kostumo, ĉaregoj, reĝisorado estas tute farita de urbanoj de *Parintins*. Ili dediĉas pli ol duonjaron da tempo por fari tion. En la festivalo troviĝas ĉaregoj pli ol 40 metrojn altaj, tambur-orkestroj de 400 homoj, 3000 dancistoj, mirindaj reĝisoradoj kaj furioza hura-batalo inter la du teamoj. Ĉio harmonias komplete sur la scenejo. Tio estas vere mirakla.

Boi-Bumbá havas ĝian radikon en "Ludo de Bovo (*Brincadeira do Boi*)". "Ludo de Bovo" estas kantoj kaj dancoj pri morto kaj regenero de bovo. La urbon *Parintins* grandigis kolonianoj, kiuj celis profiton el la prospero de kaŭĉuk-produktado en Amazonio en la fino de la 19a jarcento. Tiam "Ludo de bovo" estis transdonita de kolonianoj, kiuj venis de nord-orienta parto de Brazilo. En *Parintins* la loĝantoj aldonis originalan aranĝon al ĝi. Tiel *Boi-Bumbá* naskiĝis kiel "Ludo de Bovo" originala en *Parintins*. En komenco de la 20a jarcento aperis grupoj, kiuj ludas *Boi-Bumbá* kaj ili prezentis

kantojn kaj dancojn en lokaj festenoj.

Kvankam kaŭĉuk-industrio evoluigis la urbon *Parintins*, la industrio malprosperis ĝis la antaŭa duono de la 20a jarcento. La ekonomio de *Parintins* perdis bazan industrion kaj subiris rapide. Tiu, kiu savis la forlasitan urbon estis surprize japanaj elmigrintoj al Brazilo. Ili koloniis en la suburbo de *Parintins* kaj serĉis anstataŭan produktaĵon de kaŭĉuko. Fine ili sukcesis kultivi juton en la 1930aj post provoj kaj eraroj. La produktado de juto tuj fariĝis la baza industrio de *Parintins* kaj la urbo regajnis vigecon. De la 1940aj ĝis la 1950aj, la prospero subtenis formi multajn teamojn de *Boi-Bumbá* en la urbo. Se ne estus provo de japanoj, hodiaŭa festivalo *Boi-bumbá* ne ekzistis. La multaj teamoj de *Boi-Bumbá* ripetis sorbojn kaj unuigojn. Rezulte nur la plej malnovaj du teamoj restas. Unu el ili estas "Blua teamo", *Caprichoso*, kiu havas sian teritorion en la okcidenta parto de *Parintins* kaj multajn subtenantojn en la supera klaso. La alia estas "Ruĝa teamo", *Garantido*, kiu havas sian teritorion en la orienta parto de la urbo kaj multajn subtenantojn en la malsupera klaso. La konkuremo de ambaŭ teamoj estas vere granda. Oni diras, ke kiam ili hazarde renkontiĝis sur strato, okazis batalego, kiu fariĝis tiel malbona kiel la polico agis.

En la 1960aj produktado de juto malprosperis pro apero de kemia fibro. Ankoraŭfoje la ekonomio perdis bazan industrion. Tiam tri junuloj entreprenis festivalon por vigligi la urbon. En la komenco ili planis la unuigon de *Boi-Bumbá* sur la scenejo kiel ĉefa evento. Sed tiam oni ne povis kredi, ke ambaŭ teamoj partoprenos en sama festivalo. Ĉar tio tuj signifas batalegojn inter ili. Pro multaj kontraŭoj unuigo de

Boi-Bumbá ne okazis. Tamen en la sekvanta jaro ili elpensis la konkuran sistemon, kiu severe taksas kanton, dancon kaj kostumon. Samtempe tio inkluzivas huraon kaj sintenon de subtenantoj en la takson por eviti mok-krion kaj batalon. La sistemo sukcesis. De tiam la konkuremo de ambaŭ teamoj direktiĝis ne al batalo sur strato sed al kiel bone fari la prezentadon. Preskaŭ ĉiuj urbanaj iĝis la subtenantoj de aŭ la ruĝa teamo aŭ la blua teamo. En la urbo ĉefa koncerno de loĝantoj estis pri “aŭ ruĝa aŭ blua”. La subtenantoj fieris pri sia teamo kaj ili farbis la muron de sia domo per la koloro de sia teamo. Poste trafikŝildoj kaj telefonaj budoj estiĝis aŭ ruĝaj aŭ bluaj. Antaŭ nelonge kontraŭ *Coca-cola* kiu patronas la festivalon, la subtenantoj de la blua teamo diris: “ruĝo de *Coca-cola* ne akordas kun bluo”. Ili postulis forpreni ĝiajn ruĝajn reklamajn ŝildojn el la stadiono kaj el la blu-teamana regiono. Ĉar ili ĉesis aĉeti kokakolaon, *Coca-cola* devis ŝanĝi duonon de la ruĝaj reklamaj ŝildoj en la urbo en la bluajn. Sed bluaj teamanoj ankoraŭ ne aĉetis kokakolaon. Do finfine *Coca-cola* ekvendis bluajn kokakolaojn. Krom en *Parintins* blua kokakolao ne ekzistas en la tundo. Tiel *Parintins* estiĝis la urbo de ruĝo kaj bluo.

Ekde la 1980aj la ŝtato kaj grandaj firmaoj kiel *Coca-cola* patronis la festivalon *Boi-Bumbá*. La speciala stadiono estis konstruita por la festivalo kaj multaj turistoj ekvizitis la urbon. La turismo de la festivalo fariĝis ĉefa industrio de la urbo. Precipe profito de la vendo de la biletoj de la festivalo estiĝis grava enspezo por ambaŭ teamoj. Kvankam la kapacito de la stadiono estas 35,000 homoj, la biletoj por turistoj estas nur 5,000. La ceteraj sidlokoj estas senpagaj ekskluzive por lokaj loĝantoj. La subtenantoj kiuj sidas sur senpagaj sidlokoj huraas por sia teamo. Pro tio, ke huraon influas la konkurso, ĉiuj kiuj sidas sur la sidlokoj, devas huraŭ por sia teamo. Eĉ se sidus tie ia turisto, kiu ne scias tion, li devas subteni aŭ la ruĝan aŭ la bluan kun senhalta huraon kaj danco dum du kaj duono da horoj de prezentado de sia teamo. Kaj netaŭguloj kiuj vestas sin per blua vesto en ruĝ-teamaj sidlokoj kaj kiuj ne

huraas serioze gajnus avertojn, kaj devus foriĝi el la sidloko. La sistemo kiu estis originale kreita por subpremi batalojn vivas ankaŭ en la stadiono.

Ĉar en Amazonio tropika arbaro rifuzas homojn kaj tiu loko estas malplokisma de politika kaj ekonomia centro, estas malfacile progresigi sian industrion. Jen tie troviĝas multaj malstabilaj urbetoj ekonomie. *Parintins* estis unu el ili kiam la baza industrio, produktado de juto, malprosperis. Enradikigi fortan industrion en Amazonio estis longtempa espero de blazila registaro kaj lokaj loĝantoj. La registaro provis disvolvi agrikulturon kaj elfosadon de subtera materialo per mono de financistoj kaj grandaj firmaoj. Sed tio kaŭzadis diversajn problemojn kiel detruo la naturon, subpremo sur indianoj, ne-revenigo monon al lokaj loĝantoj. Tamen turisma progreso per *Boi-Bumbá* estas bona por naturo kaj grandiĝis per subteno de la ŝtato kaj la regiono. Sed laŭ la grandiĝo de la festivalo ankaŭ influo de regiono kaj subten-firmaoj grandiĝis. Multaj loĝantoj en *Parintins* maltrankviliĝas pro tio, ke *Boi-Bumbá* foriros de ili kaj la firmaoj prenos ĝin. La fono estas malbona ekzemplo de karnavalo en Rio kiu komerciĝis kaj turismiĝis. Rezulte longtempaj festival-amuloj foriĝas pli kaj pli. Ĉu oni povas savi kaj festivalon kaj ekonomian stabilon? Tio estas moderna problemo por turismigi la tradician kulturon. Kiel en *Parintins*? Ili havas la potencajn subtenantojn kiuj ŝanĝigis koloron de *Coca-cola*, la teamojn kiujn konservadas senpagajn hura-sidlokojn por la loĝantoj, la junulojn kiuj aŭdigis al mi hura-kanton de sia teamo kiun ili havas en poŝtelefono, kaj maljunulojn kiuj paroladas kun pasio pri sia historio de venkoj de sia teamo. Ĉi-jare venkis la ruĝa teamo *Garantido*. Ili prezentas ĉaregon pli ol 50 metrojn alta kiu estas la plej granda en la historio. Mi vidis, en *Parintins*, kiel ili amas kaj fieras sian teamon elkore. Ilia granda forteco pensigis min, ke *Boi-Bumbá* estos kun la loĝantoj eterne.

~会則追加のお知らせ~

会則追加


役員が、多忙など本人の都合によりその職務を全うできず、後任にも適任者がいない場合、全役員の権限を代表代行に委譲する。

代表代行は前任の会長が会員及び賛助会員の中から任意に選定することが出来る。代表代行の任期は代表代行業会で決議される。代表代行の設置は暫定である。役員全役職が選定されたときは代表代行が解任される。代表代行は任意に日時と場所を決め、代表代行業会を開くことが出来る。代表代行業会は JEJ の最高機関である。

代表代行業会議長は代表代行業会の参加者により選挙される。代表代行業会議長は JEJ の主たる代表者である。

本案は名簿掲載者の 1/2 以上の反対で棄却、それ以外の場合信任と見なす。

1



2



LERNEJO
ESPERANTO
RIDO
NATLIBRO
EKSPOZICIO
JAKO
LERNOLIBRO
EKZAMENO
RIPozo
NAGEJO
EKSPERIMENTO
JUNULO

JAGI

Vendejo de Frostigitaj Manĝaĵoj de Kato

HANĀSI Saĉiko

エスペ란ティストで文学者の林幸子さん作の童話「猫の冷凍食品店」をお送りします。

林さんはこの作品で98年度リブラン創作童話最優秀賞を受賞されています。

町でみつけた不思議なお店から始まる心温まる物語。

エスペラント初心者の方もお楽しみください。

S-ro Aoi, tre malĝoja, hejmen revenis de eldonejo viŝante fluantajn ŝviterojn en tiu tago.

La fabelon, kiun li kredis bone farita, la eldonisto rifuzis dirante:

“La temo estas ja bona, sed la enhavo ne tre interesa. Bonvolu klopodi iom plu.”

Nur unu monbileto de mil enoj restas en la poŝo.

“Ĉu nun estas tempo rezigni, aŭ ...”

S-ro Aoi ekrememoras la leteron, kiu alvenis hieraŭ de la patrino en la hejmloko.

En tiu letero lia patrino skribis milde, “Post nelonge bonvole revenu al hejmloko.”

Antaŭ kvar jaroj s-ro Aoi finis universitaton.

Daŭre post tio li kontinue verkis fabelon kromlaborante.

Li fabeladas kun la sento de “Mi nepre ĉi tiun fojon sukcesu!”, sed li ne facile fabelistiĝas.

Kiam li venis al la konata vojturno sopirĝemante, ŝajnas al li, ke io estas malsama de la kutima.

“Ho!? Troviĝas nova vendejo tie.”

Tie la ŝildo pendis tiel: “Vendejo de frostigitaj manĝaĵoj de Kato”.

Sed, s-ro Aoi devas atente uzi la solan monbileton de mil enoj, kaj li provis preterpasi la vendejon.

Tiam remburita katopupo alparolis lin.

“Bonvenon! Hodiaŭ estas malfermfesto de la vendejo. Ĉio estas senpaga. Bonvolu eniri!”

Li pensis, ke li vidus la katon ie, sed li ne povas rememori ĝin.

Ĉu vere ĉio estas senpaga?

“Do, vi havas dubon, ĉu ne? Vere vi povas preni ĝin senpage. Ni nur volas servi al vi.”

La kato diris amikiĝeme kaj serioze al s-ro Aoi.

“Kia ĝojo! Ĉu vere mi rajtas? Do, mi apogu viajn dirajojn ...”

S-ro Aoi kuraĝe eniris en la vendejon.

Li ĉirkaŭvidis la internon de la vendejo.

Tie troviĝis vitrinoj ĝis la plafono laŭ la muroj kaj nur unu granda vitrino en la mezo.

En la vitrinoj, ekzistis multe da pakoj de frostigitaj manĝaĵoj.

Diversaj pakoj troviĝis: “Morgaŭ”, “Memoro”, “Kolegaro”, “Sovagejo”, “Estonteco”, “Kosmo” k.t.p.

“Do, ĉu mi rajtas preni la pakon ‘Memoro’?”

S-ro Aoi heziteme prenis la frostigitan manĝaĵon en blua sako senbrue.

“Vi ja elektis bonan. Bonvolu, bonvolu manĝi ĝin plene.

Vi nepre sentos ĝin bongusta, tiel ke via koro krevos.” salutis la kato kapklinante.

Stranga vortouzado, sentis s-ro Aoi, tamen li ĝojis kaj iel ekcitiĝis.

“Dankon!”

La daŭrigo aperos en la sekvanta numero.



今年の第29回日中韓青年セミナー（KS）は、12月18日から20日まで、ベトナムのハノイで開かれます。

Webで情報交換をすることができます。

Ĉi-jara Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj (KS) okazos de la 18a ĝis la 20a de decembro en Hanojo, Vjetnamio.

Vidu la ret-paĝon.

<http://www.facebook.com/komunaseminario>

METAMORFOZO EN SCIENC-FIKCIO

= ĈU HOMO?

Lyz HUANG

コミック、映画でよく知られたスパイダーマンの主人公ピーター・パーカー、カフカ作『変身』のグレゴール・ザムザ…といった“変身”した主人公をテーマに「彼らは人間か、それとも人間でないのか?」といった視点から、論点は更にアパルトヘイトにまで及ぶ。筆者は問いかける。「本当の人間性とは?」「どうしたら相違を受け入れて平和に幸福に共存できるのか?」。そしてその答えを見つけた時に人間は…。上海在住、若干18歳のエスペ란ティスト、ライズ君によるコラムです。

"Peter Parker^{*1} iun matenon el maltrankvilaj songoj ekvekiĝinte, ekvidis sin, povantan grimpi ortan muron, eĉ eljeti araneaĵon, al Mirinda Araneviro fariĝis!" Ekde *La Transformiĝo*^{*2} pri komiksaĵo, transformiĝo estas delonge grava temo. Eble por omaĝo al malfeliĉa *Samsa*^{*2}, sekvaj scienc-fikciaj aŭtoroj ŝatas transformigi siajn ĉefrolulojn al iu fiinsekto. *La Muŝo*^{*3} kaj la pli nova *Kvartalo 9*^{*4} (nu, ja araneo ne estas insekto, nek salikoko. Almenaŭ ili ĉiuj ŝajnas malvarmsanga) ambaŭ tiel aranĝis la sorton de iliaj ĉefroluloj. Sed estas malsamo: dum oni timis la filmaj ĉefrolulojn, novjorkanojn admiras la aranevirojn kiel sia heroo.

La feliĉo de Peter Parker estas pro tio, ke lia vizaĝo ne lekthavas 8 okulojn. Liaj japanaj kolegoj, ekzemple *Kamen Rajda*^{*5} ĝuas similan privilegion de duopa identeco. Ili biologie ne estas homo, sed volonte nomas sin (arane)-Viro kaj helpas batali kontraŭ aliaj transformiĝintoj, samkiel *Jake Sully*^{*6} helpas *Naŭiojn*^{*6} kontraŭ siaj samrasanoj. Ili do vere meritas la terminon "Metamorfozo", ofte pri la maturiĝo de papiliido, ĉar ili ŝajne sin konsideras kiel iun superan, pli fortan homon.

La demando tial estus: Kial la ĉefrolulojn en ĉi tiu du filmoj oni ne konsideras kiel homojn? Korpe, Peter Parker aŭ la viktimoj de *Ŝokka*^{*5} neniel pli homas. Mense, miaopinie ne estas pruvo, ke la muŝviro vere perdis sian homecon, ĉar liajn agojn oni povas facile komprenas per tute homaj emocioj, ekzemple ĵaluzeco por lia amatino, necerteco pri lia propra transformiĝo, k.s. Neniu iam ajn pensis, ke eble la difino de "homo" estas defiinda, kaj eble *Gregor Samsa*^{*2} ankoraŭ estas la fileca filo, la kora frato.

Estas mirinde al mi, ke simple per aspekto oni povas arbitre decidi ies homecon. Kaj, aŭ per malliberigo, aŭ per kontraŭvola samigo, oni ofte penas senigi la "malnormalulojn" el la mondo. *Kvartalo 9* estas nomo

de la fikcia Apartismo-stila eksterterulo-koncentrejo; en la filmiĝo de komiksaĵo *X-homo*^{*7} la registaro volas la nov-homojn al "normaluloj" ŝanĝi. En nia mallonga historio, jam estis multe da geviroj tiel disponitaj. *Kafka*^{*1} certe konis tion, vivinte kiel judo en la imperia Germanujo. Ĉu ni ankaŭ, kiam simila realeco alfrontas nin, demandu? "Kio estas la vera homeco? Aŭ, kiel ni povas kunvivi pace kaj feliĉe kun tiuj ege malsamaj al ni?" Eble nur tiam, kiam ni trovus la solvon al la demando, ni homo povus el-krizalidiĝi, kaj flugi kiel papilio.

*1/ *Peter Parker*: 映画『スパイダーマン』の主人公。偶然、クモの能力を手に入れた主人公は自分の力に悩みながらも仮面をかぶり、スパイダーマンとして活躍する。

*2/ *La Transformiĝo*: 『変身』 *Franz Kafka* の小説。ある朝目覚めると巨大な虫になっていた青年 *Gregor Samsa* と、その家族の関係が描かれる。

*3/ *La Muŝo*: 『ザ・フライ』事故でハエと遺伝子が交じってしまった科学者が主人公の映画。肉体がハエ化し、理性を失っていく主人公と、それを助けようとする恋人の内面を描いている。

*4/ *Kvartalo 9*: 『第9地区』難民として地球にやってきた宇宙人と人類の共存をテーマにした映画。南アフリカに設置された宇宙人収容地区での小エビ型宇宙人と人類の間に起きる事件が描かれる。

*5/ *Kamen Rajda*: 『仮面ライダー』悪の組織ショッカー (*Ŝokka*) によって、改造人間にされてしまった仮面ライダーの戦いを描いた TV シリーズ。

*6/ *Jake Sully*: 映画『アバター』の主人公。近未来、惑星パンドラにおいて、原住民ナヴィ (*Naŭi*) を攻撃する人類のあり方に疑問を持った地球人 *Jake* は、ナヴィと共に生きようとするが・・・

*7/ *X-homo*: 『エックスメン』突然変異によって特殊な能力を持った人間 (ミュータント) の戦いを描いたコミックシリーズ。映画版ではミュータントと彼らに不寛容な社会との対立がテーマになっている。

